

OFICIALA ORGANO
DE LA

KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 5

Mardon, 11-an de sept. 1962

SCHWEITZER

Daurigante nian historieton pri la vido de Schweitzer, jen la dua parto skribita en la nuna tempo.

Dua Capitulo

Schweitzer havas dudek-unu jarojn. La nau venontaj jaroj apartenas al li, al lia muziko kaj al lia scienco. Li iras al la universitato, li sidas malantau siajn librojn, li ludas orgenon. Orgenludi, jam ni scias tion, estas en lia sango. Kiel arte li ludas! Nune li ne praktikas la facilajn melodiojn tiom longe, kiom antaue en la malgranda preĝejo de Gunsbach; nun li ludas la verkojn de Johanno Sebastiano Bach. Jam oni povas auskulti li en variaj koncertoj.

La verkoj de Bach tuj faras profundan impreson sur Schweitzer. Bach estas por li la plej granda el la muzikistoj. Schweitzer studas dum kelke da jaroj en Strasburgo. Li studas ankau en Berlino kaj Parizo. En ambau urboj famajn artistojn kaj profesorojn li renkontas.

Li multe amas Parizon, sed li ne trovas intereson pri la pluraj restoracioj nek por la montmartra noktovido. Li studas pri Kant kaj laboras por sia Mektoreco, au li sidas apud la fama orgenludisto Widor kaj parolas kun li pri la orgenmuziko de Bach. Schweitzer scikonas Bach pli bone ol Widor kaj ĉi-tiu petas lin por skribi libron pri Bach por la lernantoj de la pariza konservatorio.

Schweitzer studas la historion de la vivo de Jezuo. Ni scias, ke li jam havas grandegan intereson pri la vivo de nia Savinto. Kiel estas Josefo kaj Maria ĉiam malriĉaj? Ili fine havas la oron de la tri reĝoj. Tio estas facila demando. Nun ni havas multe da demandoj por fari.

Ankaŭ li serĉas respondojn. Kio estas la historia vereco pri la vivo de Jezuo? La frukto de lia multjara laboro estas lia fama libro pri la Jezua vivo.

La gepatra lingvo de Schweitzer estas la germana sed en Alsacujo ankaŭ loĝas francoj. Multaj personoj en Alsacujo parolas de la germanan kaj la francan lingvojn. Schweitzer parolas, skribas kaj pensas pere de la germana lingvo.

La leteroj, kiujn skribas Schweitzer al siaj gepatroj estas france-skribitaj ĉar en lia familio estas tradicio uzi la germanan lingvon por paroli sed uzi la francan lingvon por skribi. En la kolonio, kie li loĝas, li nature parolas ĉefe france sed liaj verkoj estas germaneskrbitaj.

Multe da tempo kaj da laboro li oferis en liaj penoj pri la vera orgeno. Li opinias, ke la malnovaj orgenoj sonas pli bone ol la modernaj kaj, ke la teknikaj progresadoj en la konstruaĵo de la modernaj orgenoj signifas nenian progresadon en la kvalito de la sono de la orgeno.

Schweitzer skribas libron pri la konstruado de orgenoj kaj ĉi-tiu libro hodiaŭ estas en la tuta mondo konata.

Eugène Méléanson.

606

ŜNI VOJOGAS

Fraŭlino Hélène Richard, kiu ĝis nun estis nia redaktistino ŝs oferis sian rezignadon. F-ino Richard foriras por Eŭropo, kie ŝi studos dum unu jaro. Ŝia foriro tre ĉagrinas nin; tamen ŝi promesis, ke ŝi sendos esperantajojn rekte el Francujo. En la nomo de ĉiuj, ni transdonas ŝies bondezirojn por ĝoja vojago kaj agrabla restado eŭropa.

SENKULPEIGO

Pro troa labora kaj ankaŭ pro libertempo de kunlaboranto, la ĉi-monata apero de l'Alvoko malfruiĝis Bonvolu senkulpiĝi nin kaj ni provos reapari pli regule ek de la venonta monato.

S-iro J. Gaucher.

HON-KONGO

De: Sino L. Hardouin

Vizitinte Japanujon, ni reprenis la aviadilon per Hon-Kongo. Ties libera haveno, estas la plej antikva el Oriento kaj postulas nenian imposton por la importitaj komercaĵoj. La Hon-Konga insulo konsistas el brita kolonio, la duoninsulo de Kowloŝo kaj la novajn Teritoriojn.

Antaŭ cent jaroj, ĝia enloĝantaro kalkuliĝis je tri milionoj kaj ili estis fiŝkaptistoj. Ŝipoj el ĉiuj landoj alvenas tiun havenon.

Victoria estas la ĉefurbo. Ŝipoj iras kaj venas inter Victoria kaj Kowloŝo transportante pasaĝerojn kaj komercaĵojn. Modernaj loĝejoj estas konstruitaj sur la flankoj de Kowloŝo kaj tie loĝas la komunistaj refuĝintoj. Hon-Kong fariĝis alloga centro por la turistoj dank'al belaj hoteloj, grandaj magazenoj kaj malgrandaj surstrataj butikoj, kiuj komunikas kun la grandaj arterioj. Oni trovas belajn sablajn bardojn, kiel "La Lido", "La Repulse Golfeto" k.t.p., La klimato estas varmega kaj belega. Tie staras multe da temploj kaj historiaj lokoj por vidi. Inter aliaj, ni vizitis la kristanvilagoŝon Aberdeen kun ties du flotantaj restoracioj nomataj "Tai-Pak" kaj "La Palaco de la Maro". Tiuj restoracioj surtabligas la fiŝojn elektitajn de la klientaro kaj kuiras ilin en tipe kantona sauco ŝatita pro ĝia delikata gusto. Tie, oni vetura per "Sampan", kiu estas por ni tute nova travivaĵo.

Ii vidas plurajn centojn da "Sampan" kaj jonkojn permesitajn unu kontraŭ la aliajn, kie vivas ĉinoj dum la tuta jaro. Ili manĝas nur fiŝojn kaj rizon. Ili estas tre malriĉaj kaj malpuraj.

Oni trovas ankaŭ ĝardenojn plejaj je eksotikaj kaj fabelaj statuoj, drakoj, k.t.p. De tiuj ĝardenoj oni ekvidas la Blankan Pagodon kun ĝiaj naŭ etaĝoj, konsiderata kiel delikata ekzemplo de la ĉina arkitekturo.

Ni vizitas la novajn Teritoriojn kaj iras ĝis Ynen Long, ĉe la landlimo de Ruĝa Ĉinujo, kie ni vidas tipe ĉinajn vilaĝojn. La monunuo estas la Hon-Konga dolaro.

Dum la vespero ni enŝipiĝas sur la "Takshing" por iri al Makao, portugala kolonio, kvardek miloj el Hon-Kongo. Oni nomas Makaon "La Orienta Monterkarlo" pro ĝia kazino, kie oni trovas Fan-tan kaj Ma-jonj. La enloĝantaro estas miksaĵo de ĉinoj, portugaloj kaj hispanoj. Ĉirkaŭ ni estas miloj da komunistoj, je kelkaj futoj de la landlimo. Tie oni malpermesas foti. Plej rimarkinde estas la laboro farata de la misistoj por la refuĝintoj.

Poste, ni vizitas la ĝardenojn kaj la groton de la senmorta poeto Camoens, kun lia torso je bronzo. Mirinda estas la fasado de la Katedralo Sankta Paulo, antikva je pluraj jarcentoj. Ni vizitas, de la ĉina dinastio el Manĉu, la malnovan restaĵon de Sun Yat Sen, la plej riĉa viro primarmorkolekto, jado kaj eburo, senprezaj riĉaĵoj. Ankaŭ tie oni povas vidi multajn sampajn kaj jonkojn. La monunuo estas la eskudo.

Post ripostago, ni denove foriras al Bangkoko en Tajlando. La loĝantoj estas la Mongoloj. Bangkoko estas senkompara urbo pro la riĉeco de siaj belegaj palacoj kaj siaj tricentkoloraj budaj temploj. Pluraj el ili estas modernaj ekzempleroj de la sinesa skulptarto.

La plej famaj temploj estas tiu de la "Smeralda Budde" (Wat Phra Keo), kun ĝia stranga muro de Kamayana kaj la giganta demonstatuo, kiu gardas la antaŭpordon.

Inter la riĉaĵoj, kiujn oni povas renkonti en Bangkoko estas "La Marmora Templo" (Wat Benchamalapit), juvelŝtono de la religia siama arkitekturo. Ankaŭ "La Templo de la Komenciĝo" (Wat Aroon), kiu dank'al ĝia alta turo fariĝas la plej monumenta karakterizaĵo bankoka.

Io, kio ege mirigas la turistoj estas la temploj kaj la stangaj statuoj faritaj el oro kaj juvelŝtonoj. Tajlando estas lando de budistoj. Oni nomas ilin "Bonzo", havas la kapon razitan kaj oranĝkolore vestigas. Ili ĉiam preĝas kaj vivas malriĉe.

Frumatene, ni foriras en ŝipeto sur la rivero CHAO PHYA ties kanaloj, kie oni vidas flosantan vendejon, ĉiu operas distraĵon unikan. Sur tiuj mallargaj kanaloj veturas ŝipetoj sed ĉefe ŝalupoj en kiuj oni transportas legomojn, fruktojn, viandojn, k.t.p. Ili vendas tiun nutraĵon al la malgrandaj rudimentaj domoj konstruitaj ĉe ĉiu flanko de la kanaloj: oni nomas ilin ŝipdomojn. En tiuj reveroj malprofundaj, la tieuloj sin banas, lavas sian veston kaj eĉ la infanoj sin amuzas. Kiel pitoreskaj kaj neforgesindaj estas la scenoj de la virmaniero de tiuj feliĉaj homoj.

La vetero estas varmega (97°F) kaj malseka. Ria vetero estas tre malfacile soportebla por la fremduloj.

Estas multe pli por skribi pri Bangkoko sed estas necese daŭrigi mian vojaĝon al Singapuro.


(Daŭrigota)



Yvette B. Dore

KRUCVORTENIGMO

De Vincent Beaupré



HORIZONTALA

- 1 - Aplaudi - laŭdi
- 2 - Kvarpiedalo el perno - cifero - malo de eliri (Apostrofita)
- 3 - Fari ion - pivoto - en fari
- 4 - Prefikso - Narn - tempformo
- 5 - ilo por fari franĝon
- 6 - Korelativa vorto (renverse) - danca - kunveno
- 7 - veturilo - pivoto
- 8 - Egalvalori
- 9 - Aleksander Borodin - en ĉirka - artikolo
- 10 - En rigida - Kondimento (renverse) - muzika bruo (apostrofita)
- 11 - En mendi - Andrew Jackson - taksi
- 12 - Senegala - en agrikulturo

VERTICALA

- 1 - Distingebla - plaĉu
- 2 - Terlimigite - artikolo - posedaĵo (apostrofita)
- 3 - Havi dolĉan Korsenton - abismo (apostrofita) - literoj de Genio
- 4 - cifero (renverse) - pia ceremonio - Daniel Keefe
- 5 - scienco
- 6 - Ordinala numuro (AK) - senkolora
- 7 - En eksaĝ - Ĥklinaj
- 8 - Oni metas iun en banon (kua pronomo)
- 9 - En legi - konstipo (apostrofita) - Johann Gutenberg
- 10 - Partiana (sufikso) - olai - prepozicio
- 11 - Malo de puŝo - du similaj vokaloj - besto on loĝejo
- 12 - Parto de la okulo - parto de veste (apostrofita)